

Jadwiga Gibczyńska vivo dediĉita al teatro



Unu el la plej brilaj steloj de la Esperanta teatro, la pola aktorino Jadwiga Gibczyńska, forpasis la 13-an de julio 2012 en Krakovo.

Ŝi naskiĝis la 26-an de junio 1924. En 1959 ŝi diplomiĝis kiel profesia aktoro, post kio ŝi laboris en multaj polaj teatroj kaj teatraj ensembloj. Ŝi esperantistiĝis en 1963 kaj tuj dediĉis sin al aktorado en Esperanto. Gibczyńska kontribuis al la arta programo de multaj Universalaj Kongresoj, unuafoje en Hago en 1964 per *Vojaĝo al la verdaj ombroj* de la dana verkisto Finn Methling. Poste ŝi aktoris aŭ deklamis en la UK-oj de Tokio (1965), Budapeŝto (1966), Kopenhago (1975), Lucerno (1979), Vankuvero (1984), Varsovio (1987), Tampereo (1995), Prago (1996) kaj Adelajdo (1997). En tiu lasta ŝi prezentis interalie sian

porscenejan adapton de la taglibro de Ada Fighiera-Sikorska, *De tajgo al minaretoj*, kiu poste estis eldonita de UEA libroforme (2000). En 1996 aperis la sonkasedo *Neniu povas ŝanĝi la hieraŭon*, en kiu ŝi legas originalajn Esperanto-poemojn de Aira Kankkunen.

Krom en multaj eŭropaj landoj, Gibczyńska gastis en Japanio kaj Kanado. En sia hejma Pollando ŝi prezentiĝis preskaŭ ĉie, kie agadis esperantistoj. Sukcesan eksperimenton ŝi faris en Svedio, prezentante en lernejoj rakonton pri atomeksplodo, kun samtempa traduko en la svedan. La aktorino prezentis la teatraĵojn apartenantajn al la t.n. "Teatro de unu aktoro" kaj kontribuis ankaŭ per verkado, traduko, adapto kaj reĝisorado.

Ŝi ankaŭ instruis Esperanton rektmetode en Pollando kaj alilande. De 1981 ĝis 1989 ŝi estis juĝanto pri teatraĵoj por la Belartaj Konkursoj de UEA. En 2001 ŝi malfermis en Krakovo la Esperantan teatron "Areno", kiun ŝi gvidis dum pluraj jaroj.


En 1996 Jadwiga Gibczyńska ricevis premion de Fondaĵo Antoni Grabowski, kaj en 1997 ŝi fariĝis Honora Membro de UEA.



Arno Lagrange kaj aliaj kontribuintoj verkis legindan artikolon pri ŝi en Vikipedio. En ĝi li listigis kelkajn teatraĵojn de ŝia repertuaro:

1. *Vojaĝo al verdaj ombroj* de Finn Methling (dramo pri la sorto de virino ekde infanaĝo ĝis la morto en maljunaĝo trad. Józef Toczyski);
2. *Maria Curie* (biografia prezentaĵo de la fama Nobel-premiita sciencistino Maria Skłodowska-Curie, surbaze de memuaroj, leteroj, k.s.);
3. *Slavaj fabeloj* de Bolesław Leśmian: (trad. Lidia Ligęza);
4. *Zamenhof* de J. Gibczyńska: (pere de la monologoj de la patrino Rozalia, la edzino Klara kaj la filino Lidja, oni vidas la vivon de Zamenhof);
5. *Signaloj* de Johano Paŭlo la 2-a: (fragm. el "Antaŭ vendejo de la juvelisto" trad. T. Tyblewski);
6. *Ludilo de dioj* de J. Gibczyńska: (monologo de Sapfo, fama poetino de la amo, kiu vivis en Lesbo en la 6-a jc. a.K.);
7. *La febla sekso* (kompilaĵo de distraĵ monologoj de virinoj);
8. *Ĉu la nepoj nin benos ?* de Gudrun Pausewang (fikcia rakonto, kreita surbaze de la "La lastaj infanoj de Oldrovalo", esperantigita de Joachim Giessner, pri la danĝero de la atoma milito);
9. *La Falanto* de Sławomir Mrożek: (tragikgroteska situacio post la kosma katastrofo, kiam ĉio falas... eĉ la raportanto).
10. *La bela indiferentulo* de Jean Cocteau.

Pri ŝia adapto de *De tajgo al minaretoj*, Rejna de Jong faris recenzon:



Taglibro sur scenejo

Jadwiga Gibczyńska ekhavis la bonan ideon verki monodramon laŭ la ĉi-supre menciita libreto. La militaj travivaĵoj de Ada Sikorska-Fighiera ja estas ne nur interesaj, sed samtempe ili rememorigas tre meritplenan samideaninon.

Komence la aktorino alparolas la publikon kaj montras la taglibreton de Ada. Poste ŝi prezentas sin kiel la onklinon Helena Terlecka, al kiu Ada kiel 11-jarulino skribis leterojn el siaj ekzillokoj. Helena aŭ "onjo Lunja" -- la karesnomo de Ada por ŝi -- rakontas pri la najbara Sikorski-familio, pri la deportado de la patro, la generalo Sikorski, de kiu ili post 1940 ne plu ricevis leterojn.

Venis la tago kiam ankaŭ Ada kun la patrino, la avino kaj fratineto ekziliĝis.

Jadwiga nun legas fragmentojn el la leteroj de Ada, kiuj formas la ĉefajon de la monodramo. Tamen inter ili la "onklino" komentarias, eksplikas.

Tiel estiĝas sufiĉe da vario por teni la atenton de sendube entuziasma publiko.

Jadwiga aperas jam en la 50a Universala Kongreso de Esperanto en Tokio (1965) kun *Vojaĝo al verdaj ombroj* de Finn Methling kaj en la 51a UK de Esperanto en Budapeŝto (1966) kun *La Eta Princo* laŭ Antoine de Saint-Exupéry.

Paul Gubbins kunlaboris kun Jadwiga Gibczyńska - Grabowski-premiito ekde la 81a Universala Kongreso de Esperanto en Prago (Ĉeĥio) en 1996 - pri monologo *Noemi*, kiun li verkis aparte por ŝi. Jadwiga prezentis *Noemi* dum la 82a Universala Kongreso de Esperanto en Adelajdo (Aŭstralio) en 1997 kaj dum aliaj E-eventoj.

Post alia prezentado en Italio (1996) Jadwiga leteris al Paul Gubbins i.a.: «Post kurtenfalo estis silento, poste fortaj aplaŭdoj. Ĝis kongres-fino oni min gratulis kaj komplimentis, eĉ per tro laŭtaj vortoj.» Poste: «La artaĵo efikis tiel: al unuaj ĝi korskuis, aliajn ofendis kaj ankaŭ donis multon por pripensadi. *Noemi* ne postlasas homojn indiferentaj.»

Pri la teatraĵo "Zamenhof"

„ La teatraĵo de s-ino Jadwiga Gibczyńska estis vere kortuŝa prezentaĵo. Ŝia emociiga talento kaj klara voĉo pli briligis la prezenton. Spektante la teatraĵon mi sentis tiel, ke mi kvazaŭ legus la biografion de Zamenhof, verkita de Edmond Privat. Rondvojaĝante tra la mondo, ŝi povus prezenti sian talenton, kio multe helpus nian movadon. Plie, se estus vidbendo de ŝia prezentado, mi estus pli

kontenta kaj ĝoja. Ankoraŭfoje mi kore dankas kaj sincere salutas al kara samideanino, s-ino Jadwiga Gibczyńska.

Altkvalitaj estis la unuaktoraj dramoj de Jerzy Fornal ("Arlekeno" de Janusz Korczak) kaj Jadwiga Gibczyńska ("Signaloj" de Karol Wojtyła kaj "La Falanto" de Sławomir Mrożek) en la 30a Tutpollanda E-Kongreso (la 28 aprilo -- 3 majo 2000 Krakovo). ”

— *neprovizita fonto*

Jadwiga Gibczyńska aperas en la 10a "GRUPE" – Gliwice'a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto 12.11.2000

La Papaj Signaloj en Gliwice

„Gesamideanoj el diversaj landoj, kristanoj de diversaj konfesioj kune preĝis en la sama lingvo al la sama Dio, partoprenis diservojn, kantis kaj havis la eblecon admirari la dramon "Signaloj" de Johano Paŭlo la 2-a, kiun prezentis dum la arta programo pola aktorino Jadwiga Gibczyńska. La aktorino bonege sukcesis transdoni al la spektantoj la enhavon de la teatraĵo, la pensojn de la aŭtoro -- nia Sankta Patro.

Estas interese, ke la aktorino kaj Papo ambaŭ estas poloj el la sama urbo Krakovo. Jadwiga Gibczyńska jam multfoje kaj sukcese prezentis verkojn de Papo Johano Paŭlo la 2-a. Ĉiuj spektintoj estas dankaj al la aktorino.

Necesas aldoni, ke la tekston de "*Signaloj*" esperantigis dum la milita stato en Pollando meritplenaj verkistoj kaj

esperantistoj, jam forpasintaj, pastro Jan KOS kaj
d-ro Tyburcjusz Tyblewski. ”

- *Bogusław Sobol, La Papaj Signaloj en Gliwice*
en "La Ondo de Esperanto"

Al la arta parto de ILEI-Konferenco 1997 kontribuis ankaŭ
Jadwiga Gibczyńska per la teatraĵo "Ĉu la nepoj nin benos _?"
En la arta programreto de la Preĝtagoj de Polaj Esperantistoj
en Ĉenstohovo la 14-15.10.2000 E-aktorino Jadwiga
Gibczyńska deklamis fragmentojn el "Myśląc Ojczyzna"
(*Pensante Patrujo*) de Karol Wojtyła.

Esperantistino Kerstin Rohdin /legu: ĉerstin rudin/ el Svedio
bonege konis Jadwiga Gibczyńska /legu jadviga gibĉinska/, kiu
kelkfoje vizitis ŝian landon. Jen kiel Kerstin mencias Jadwiga:

*Ni estis longjaraj amikinoj Jadwiga G kaj mi. Mi aranĝis
kelkfoje "turneojn" por ŝi en Svedio. Unuan fojon mi vidis ŝian
prezenton estis en la renkontiĝo (Inter dunoj) ĉe la Balta maro.*

(...)

*Kiel mi jam skribis mi aranĝis por JG turneojn en Svedio
almenaŭ dufoje, en mia regiono ankoraŭfoje, dum landa
kongreso unufoje. Unufoje ŝi prezentis en gimnazio kaj mi
samtempe interpretis ŝian tekston. Estis "Infanoj de Oldrovalo"
el libro de Gudrun Pausewang trad. de Joachim Giessner. JG
prezentis ankaŭ en Japanio. Ŝi multe prezentis en Pollando.*

Intervjuo al Jadwiga Gibczyńska

La krakova ĵurnalo *Dziennik Polski*, en sia numero de la 24a de junio 2006, publikigis artikolon kun intervjuoj kun pluraj esperantistoj; inter ili troviĝis Jadwiga Gibczyńska. Temis pri raportaĵo el la plumo de Katarzyna Kobylarczyk sub la titolo "Lenin w wieży Babel" ("Lenin en Babelturo"). Ĝin reproduktis kovrilpaĝe la revuo *Pola Esperantisto* n-ro 4 de 2006 kaj aldonis ke la menciita artikolo aperis "dum la krakovaj solenaĵoj de 100-jariĝo de esperantista movado en Krakovo kaj 100-jariĝo de Pola Esperantisto."

Jen la parto pri nia aktorino (koran dankon al Przemysław Wierzbowski pro lia afabla korektado de maŝintraduko):

Sinjorino Jadwiga per lingvo malfermas la mondon

- *Ĉio okazas sur la scenejo* - Jadwiga Gibczyńska malfermas la pordon. - *Tiu ĉi estas magia loko, la plej bona spektaklejo en Krakovo, nomata la Deksepa...*

La unuan lundon de ĉiu monato en la ĉambro n-ro 17 de la Urbocentra Kulturdomo estas spektaklo de la Esperanto-teatro "Areno".

Marian Kostecki: - *S-ino Jadwiga, drama aktorino, venis al ni en la 60aj el Gdansko. Ŝi eklaboris en la Popola Teatro kaj kreis la esperantan teatron de unu aktoro.*

Jadwiga Gibczyńska ĉiam sentis sin bone sur scenejo, sed mankis al ŝi io por havi feliĉan vivon. Iun tagon ŝi ricevis la proponon prezenti teatraĵon en Esperanto. Ŝi parkerigis la tekston.

Tiam ŝi iris al esperanta kongreso en Hago.- *Mi vidis ke tiuj homoj dekomence estas tre proksimaj unuj al la aliaj, tiel fratecaj, ili reciproke brakumis kaj kisis tute malfremde.* - ŝi rememoras.

Ŝi revenis al la marbordo kaj aliĝis al kurso. La celo simplis: per la lingvo malfermi por si la mondon. Kaj tio estis sukcesa.

Jadwiga Gibczyńska: - *Kiel esperanta aktorino mi estis logaĵo. Kien ajn mi iris tuj venis ĵurnalisto, iu paroligis min per mikrofono.*

Esperantistoj pagadis la vojaĝon, manĝadon kaj loĝadon. Interŝanĝe, ili volis ke ŝi ludu. Ŝi vagadis, estis kiel vagabondo. Kelkfoje ŝi sukcesis havigi al si bonan scenejon, foje naĝejon, aliffoje ŝi ludis en privata loĝdomo... Anglio, Skotlando, Skandinavio, Germanio... En Germanio ŝi konvinkis sin ke Esperanto estas vere neŭtrala lingvo.

- *Mi vivis ĉe geedza paro de esperantistoj, ni kune vespermanĝis, la konversacio turniĝis al milito. Kaj tiam mi sciiĝis ke la sinjoro konas ion pri unu regiono de Pollando.*

Temis pri Aŭŝvico.

- *Se ni parolus en ajna alia lingvo, certe okazus kverelo. Aŭ li tute ne mencius tion. Kaj tamen io liberiĝis en li. Kaj poste mi veturis al Japanio. Tio estis mirinda.*

Jadwiga Gibczyńska pri si mem

Junage mi aŭdis pri Esperanto. Mia generacio travivis la duan mondmiliton kiel infanoj jam spertinte teruraĵojn, ni restis idealisme fidemaj al la ideo de Ludoviko L. Zamenhof pri la paca lingvo, helpa por ĉiuj homoj. Estinte studentino de la Aktora Altlernejo en Krakovo mi deziris kaj planis ekposedi ĉi logikan, facilan kaj belsonan lingvan ilon, kiu eble helpos al mi vivi. Sed unue necesis por la malriĉa junulino akiri firman, stabilan pozicion profesie.

Komence de la jaroj 60-aj de la pasinta jarmilo mi sukcese aktoris en la prestiĝa pola teatro „Teatr Wybrzeża” en Triurbo (Gdynia - Gdańsk - Sopot). Subgvide de famaj reĝisoroj i.a. Goliński, Gruda, Swinarski mi plenumadis gravajn rolojn, ricevadis bonajn recenzojn do mia financa situacio estis relative bona, sed mi kaŝdeziris larĝigi mian artan agadsferon, kreopovi memstare proprajn ideojn, ludi por pli vasta diversnacia spektantaro, vivi pli libere ol tion permesis la ŝtatsistemo... nu almenaŭ ekpruvi, ĉu vere mi kapablas realigi la dezirojn, kiuj bolis en mia kapo. Iun tagon mi firme decidiĝis: Jadwiga, ek en Esperanton!

Trovi esperantistojn en Triurbo estis tre facile, ĉar videble aktivis multloke Pola Esperanto-Asocio. E-kluboj svarmis per diversaj programeroj, funkciadis lingva instruado. Mi aliĝis al espe-rantistoj en Gdynia, ĉar mi tie loĝis – en amika rondo mi pasigis bonan tempon kun la homoj, kiujn mi regule kontaktas ĝis nun.

La lingvon mi devis lerni aŭtodidaktike, pro maleblo regule frekventi lecionojn. Mia situacio pliboniĝis danke al Pola Radio en Gdańsk, kie ankaŭ funkciis iom neoficiale la konversacia

rondo por parolistoj, redaktoroj, ĵurnalistoj gvidata inventoplene de prof. J. Toczyski. Post mallonga tempo, danke al li, mi parolis esperantlingve en la ĉiusemajna esperanta kvaronhoro disaŭdigata per Gdanska Radio.

Prof. J. Toczyski tradukis por mi la monologon de dana verkisto Finn Methling „Vojaĝo al verdaj ombroj”. Ĝi estis la unua programero en la repertuaro de mia Esperanta Unuaktora Teatro.

Kiam la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio – prof. Ivo Lapenna vizitis Gdanskon dum du tagoj, oni preparis densegan programon, konferencojn, kunvenojn, fine solenan adiaŭon kaj post vespermanĝo, dum arta programo okazis mia „Vojaĝo al verdaj ombroj”. Kun batanta koro mi monologis tre emocie. La eminenta spektanto aŭskultis kaj spektis tre atante. Mi ne rajtas forgesi la konkludajn vortojn de Ivo Lapenna: - „Jadwiga, vi enpaŝas nun vian ĝustan vojon, daŭrigu ĝin eĉ se estos malfacile. Sed ne forgesu daŭre plibonigadi vian Esperanton.“

Jam post kelkaj monatoj mi ĉeestis unuafoje la Universalan Kongreson de Esperanto en Hago kaj monologis tie mian „Vojaĝon...” dum arta kunveno por multkapa publiko, kaj la jaro 1965-a portis min Japonion. Dum la Universala Kongreso de Esperanto en Tokio mi teatris sur bela japanstila scenejeto por anoj de UMEA (Universala Medicinista Esperanto-Asocio), poste en Oomoto Centro dum Internacia Festivalo mi deklamis poemojn kun japanaj artistoj.

En oficialaj programoj de Universalaj Kongresoj mi prezentis jenajn teatraĵojn:

- en Budapeŝto (1966) – „Vojaĝo al verdaj ombroj” de Finn Methling kaj „La Eta Princo” de Antoine de Saint-Exupéry, kiu tradukis kaj enscenigis mi mem;
- en Kopenhago (1975) – „Galoŝoj de feliĉo” de Christian Andersen kaj „Maria Curie”, surbaze de biografiaj materialoj, kompilis kaj enscenigis mi mem;
- en Lucerno (1979) – „Slavaj fabeloj” de Bolesław Leśmian, kiu tradukis Lidia Ligeza kaj „Maria Curie”;
- en Budapeŝto (1983) – „Zamenhof” – mia aŭtora teatraĵo verkita surbaze de materialo de Privat, Varinghien, Boulton k.a.;
- en Vankuvero (1984) – „Zamenhof”, „Maria Curie” kaj „Indianaj fabeloj”- tekstoj de malnova folkloro de Kanado, prilaborita surloke;
- en Varsovio (1987) – „Zamenhof”;
- en Tampere (1995) – „Zamenhof”, la centa plenumiĝo de tiu ĉi spektaklo, „Rakontoj pri Sarajeva seĝo” - raportoj de ĵurnalisto Zlatan Disdatevio, „La Falanto” de S.Mrozek, kiun tradukis Tyburcjusz Tyblewski;
- en Prago (1996) – „Sopiro al puraj fontoj”- originala poemo de Kazimierz Szczurek;
- en Adelajdo (1997) – „Zamenhof”, „De tajgo al minaretoj”- el la taglibro de 11-jara Ada Sikorska-Fighiera, en mia prilaboro kaj „Noemi” de Paul Gubbins;

Mi devas substreki miajn prezentaĵojn enkadre de du Kongresoj de IKUE en Częstochowa – „Signaloj”, fragmento el „Antaŭ vendejo de la juvelisto” de Karol Wojtyła, elpoligita de sac. Jan Kos kaj Tyburcjusz Tyblewski.

/Teksto ricevita dank'al samideanino Grażyna Porada/

Dum sia unua partopreno en Universala Kongreso de Esperanto (en 1964 jaro en Hago - Nederlando) kaj prezento de *Vojaĝo al la verdaj ombroj* Jadwiga Gibczyńska faris notojn en sia kongresa libro:

(...) [mi estas] laca kiel hundo kaj malsata kiel hundo, eĉ mi ne plu povas ĝoji. Poste, mi ricevas diversajn donacetojn - kiel agrable! Mi iras al Toczyski, tie ankaŭ estas esperantistoj. Mi parolas kun la nederlandano, pri Esperanto kaj pri la vivo kaj tiel plu. Io en mi transrompis, kaj nur de tiu momento mi komencas kompreni pri kio temas, kio okazas. Nur nun mi naskiĝis kiel esperantistino. Povas esti, ke dank'al tio, ke mia arto ekplaĉis aŭ eble ĉar mi finfine trovis komunan lingvon kun ili.

ESPERANTA TEATRA SCENO "ARENO"

Estis fondita ĉe Krakova Urbocentra Kulturdomo en Krakovo en februaro 2001 pro bezonoj de krakova medio esperantista - i.a. Krakova Societo ESPERANTO - kaj interesiĝo de simpatiantoj de esperanto. Iniciatinto kaj artgvidanto de "Areno" estis profesia aktorino Jadwiga Gibczyńska.

La nomo "Areno" indikas diversecon de prezentado-formoj, kiuj sinsekve aperadis sur la scenejo, kaj do: programoj teatraj, kant-muzikaĵoj, beletro poezia k. proza, prelegoj kun lumbildoj, kaj diversaj aliaj iniciatoj de kreivaj homoj.

Noveco de "Areno"-formulo konsistis en tio, ke la kontakto de aktoroj kun publiko okazadis en du lingvoj - la pola kaj la

esperanta - kiuj riĉigis spektaklojn kaj igis ilin percepteblaj ankaŭ por neesperantistoj. Tiudirekte disvolviĝas la specifa stilo de "Areno", kiu esence estas servonta transdoni diversecojn de kulturoj, kaj strebas firmigi interhomajn rilatojn.

La prezentoj estis tre malsamaj, ofte preparitaj rapide, kaj eĉ improvizitaj sed invencio de prezentistoj ĉiam estis bazita sur bonaj literaturaj tekstoj.

La formoj estis diversaj: monodramoj, duopo-dramoj, "teatro ĉe la tablo," ciklojn de konataj aŭtoroj, programoj de poezio kaj muziko, legadoj de poezio kaj prozo, prezentoj de kantistoj: korusoj kaj solistoj, instrumentistoj, prelegoj kun montrado de diapozitivoj, flamenco- kaj keltaj dancoj kaj ankaŭ pluraj improvizaĵoj de talentaj homoj.

La prezentistoj estis ambaŭ maljunuloj kaj junularo, de Krakovo kaj vizitantoj de aliaj urboj, famaj aktoroj - profesiaj kaj nekonataj teatro-amantoj, diversaj inĝeniaj "hazardludantoj", aktivaj observantoj - recenzistoj kaj multaj aliaj kreativaj homoj. Poste al "Areno" aliĝis ankaŭ grupoj de infanoj akompanataj de instruistoj. Ili estis "Malgrandaj pillueloj" el - proksima al Krakovo - vilaĝo Czajowice kaj infanoj el Krakovo Muziko-Lernejo por la Blindaj kaj Parte Vidantaj.

Pola Ret-Radio, en sia elsendo de la 24a de julio 2012, parolis pri la forpaso de la pola aktorino. Barbara Pietrzak konigis arkivan interjuon kiun ŝi faris al la grava artistino en 1996. Eblas ĝin aŭskulti kaj rigardi sub formo de filmeto kun sinsekvo de bildoj de Jadwiga publikita en la retejo YouTube: <https://goo.gl/my0Equ>

Jadwiga Gibczyńska

życie poświęcone teatrowi



Jedna z najjaśniejszych gwiazd teatru esperanckiego, polska aktorka Jadwiga Gibczyńska, odeszła w dniu 13 lipca 2012 roku w Krakowie.

Urodziła się 26 czerwca 1924 roku. W 1959 roku ukończyła studia aktorskie, po czym pracowała w wielu polskich teatrach i zespołach teatralnych. Esperantystką została w 1963 roku i od razu poświęciła się sztuce aktorskiej w esperancie. Gibczyńska przyczyniła się do programu artystycznego wielu Światowych Kongresów, po raz pierwszy w Hadze w 1964 roku prezenując "Podróż do zielonych cieni" duńskiego pisarza Finn'a Methling'a. Później grała lub recytowała podczas kongresów UK w Tokio (1965), Budapeszcie (1966), Kopenhadze (1975), Lucernie (1979), Vancouver (1984), Warszawie (1987), Tampere (1995),

Pradze (1996) i Adelaide (1997). W tym ostatnim wystąpiła m.in. ze swoją adaptacją sceniczną pamiętnika Ady Fighiera-Sikorskiej "Od tajgi do minaretów", która później została opublikowana przez Światowy Związek Esperanto UEA w formie książkowej (2000). W 1996 roku ukazała się kasetka magnetofonowa "Nikt nie może zmienić wczorajszego dnia", w którym czyta oryginalne wiersze esperanckie autorstwa Aira Kankkunen.

Oprócz wielu krajów Europy, Gibczyńska gościła w Japonii i Kanadzie. W swojej ojczyście Polsce występowała niemal wszędzie, gdzie działali esperantyści. W Szwecji przeprowadziła udany eksperyment prezentując w szkołach opowiadanie o wybuchu atomowym z symultanicznym tłumaczeniem na język szwedzki. Aktorka prezentowała sztuki należące do tzw. "Teatru jednego aktora", a także tworzyła własne teksty, wykonywała tłumaczenia i adaptacje oraz reżyserowała.

Ponadto również nauczała języka esperanto metodą bezpośrednią w Polsce i za granicą. Od 1981 do 1989 roku była jurorem teatralnym w Konkursach Sztuk Pięknych przy UEA. W 2001 roku otworzyła w Krakowie esperancki teatr "Arena", który prowadziła przez kilka lat.

W 1996 roku Jadwiga Gibczyńska otrzymała nagrodę Fundacji Antoniego Grabowskiego, a w 1997 roku została honorowym członkiem UEA.

Polskie Radio Internetowe w swojej audycji z dnia 24 lipca 2012 roku, mówiło o śmierci tej polskiej aktorki. Barbara Pietrzak zapoznała słuchaczy z archiwalnym wywiadem przeprowadzonym z tą pełną energii artystką w 1996 roku. Można go posłuchać i obejrzeć w postaci filmiku z sekwencją zdjęć Jadwigi, opublikowanego w serwisie YouTube: <https://goo.gl/my0Equ>

W esperanckiej Wikipedii (wolnej encyklopedii) Arno Lagrange opublikował artykuł poświęcony z Jadwidze Gibczyńskiej z listą kilku sztuk teatralnych z jej repertuaru.

W krakowskiej gazecie "Dziennik Polski" w numerze z 24 czerwca 2006 ukazał się artykuł z wywiadami z kilkoma esperantystami; wśród nich była Jadwiga Gibczyńska. Była to relacja pióra Katarzyny Kobylarczyk pod tytułem "Lenin w wieży Babel". Został powielony na okładce tytułowej przez czasopismo Pola Esperantisto nr 4 z 2006 roku z uzupełnieniem, że wspomniany artykuł pojawił się podczas krakowskich uroczystości 100-lecia ruchu esperanckiego w Krakowie i 100 lecia Pola Esperantisto.

Podczas swojego pierwszego wyjazdu na światowy kongres esperanto (w 1964 roku w Hadze - Holandia) po przedstawieniu *Podróż do zielonych cieni* Jadwiga Gibczyńska zanotowała w swojej książce kongresowej:

(...) zmęczona jak pies i głodna jak pies nawet już nie potrafię się cieszyć. Później dostaję różne prezenciki, drobnostki - ale przyjemnie! Idę do Toczyskiego, tam też esperantyści. Gadam z Holendrem, o esperanto i o życiu itd. Coś się we mnie przełamało i od tej chwili dopiero zaczynam rozumieć o co w tym wszystkim chodzi. Dopiero teraz rodzę się jako esperantystka. Może dlatego, że moja sztuka (za)chwyciła a może dlatego, że znalazłam wreszcie z nimi wspólny język.

ESPERANCKA SCENA TEATRALNA "ARENA"

Powstała przy Śródmiejskim OŚrodku Kultury w Krakowie w lutym 2001 w odpowiedzi na potrzeby krakowskiego środowiska esperantystów skupionych m.in. przy Krakowskim Towarzystwie ESPERANTO. Inicjatorką i kierownikiem artystycznym była aktorka JADWIGA GIBCZYŃSKA.

Nazwa "ARENA" wskazuje na różnorodność form prezentacji, które kolejno przewiły się na scenie, takie jak: programy teatralne, muzyczno-wokalne, literackie, plastyczne, prelekcje z przeżroczami i różne inne inicjatywy zdolnych ludzi.

Nowość formuły "ARENY" polegała na tym, iż kontakt sceny z widownią odbywał się przy pomocy dwóch języków - polskiego i esperanckiego - które razem wzbogacają spektakl. W tym kierunku rozwijała się specyfika stylu, który merytorycznie miał służyć jako przekaz umacniania więzi międzyludzkich.

Spektakle były bardzo rozmaite, często z konieczności przygotowywane szybko, a nawet improwizowane ale inwencja wykonawców oparta była zawsze na dobrych tekstach literackich.

Prezentowane formy były różnorodne: monodramy, duo – dramy, - „teatr przy stoliku”, cykle znanych autorów, programy poetycko – muzyczne, wieczory autorskie poezji i prozy, występy wokalistów: chóry i soliści, instrumentalności, prelekcje z przeżroczami, pokazy flamenco i tańców celtyckich, również różne improwizacje zdolnych ludzi.

Wykonawcami byli seniorzy i młodzież, krakowianie i goście z innych miast, znani aktorzy – profesjonaliści i nieznani miłośnicy teatru, różni pomysłowi ryzykanci, aktywni obserwatorzy – recenzenci i wielu innych twórczych ludzi. Później weszły do „Areny” również dzieci przyprowadzone przez nauczycielki, były to „Małe urwisy” z podkrakowskiej wsi Czajowice i dzieci z krakowskiej Szkoły Muzycznej dla Niewidomych i Słabowidzących.

Kaj jen listo de prezentoj de E-Scenejo „Areno” dum la jaroj 2001 – 2005 en la teatra scenejo de Krakova Urbocentra Kulturdomo:

A oto spis wykonywanych prezentacji Esperanckiej Sceny „Areno” w latach 2001 – 2005 na scenie teatralnej Śródmiejskiego Ośrodka Kultury:

Jaro 2001 / Rok 2001

- 1** - Spektakl inauguracyjny - „Sygnały”/-„Signaloj” Karola Wojtyły – monodram Jadwigi Gibczyńskiej,
- 2** - „Eterne Rima” – Igor Wasilewski – esperancki raper i jego hip hop
- 3** - „Japońska terapia Yumeiho wg Masayuki Sajonji (Tokio)/ - „Japana Yumeiho terapio” – prelekcja dr. Włodzimierza Opoki.
- 4** - Autorski wieczór poezji esperanckiej Lidii Ligęzy /Autora wespero de esperanta poezio
- 5** - „Historia powstawania pewnego obrazu”/ - „Kiel estas kreata la pentraĵo” Andrzeja Kołpanowicza.
- 6** - „Pan Tadeusz”/ - „Sinjoro Tadeo” Adama Mickiewicza – monodram Anny Ramzy – Radłowskiej.
- 7** - „Jan Tajemnik”/ - „Johano Sekretulo” Bolesława Leśmiana – duo – dram Jadwigi Gibczyńskiej i Lidii Ligęzy.
- 8** - „Tym, którzy odeszli” / - „Al niaj forpasintaj samideonoj” – Zespół esperancki - „Sąsiadki”/ - „Najbarinoj” z Krzeszowic.
- 9** - „ Esperanckie Dni Krakowa” – poemat - „Człowiek”/ - „Homo” w wykonaniu Jadwigi Gibczyńskiej

Jaro 2002 / Rok 2002

- 10** - „Zespół Esperancki - „Kamea” wita Nowy 2002 Rok” / - „Ensemblo - „Kamea” salutas Novan 2002 Jaron”. Kierownictwo muzyczne – Zbigniew Warmuz.
- 11** - „W poszukiwaniu pradawnych śladów”/ - „Serĉante praajn spurojn” – - „Bhagavadgita” – w wykonaniu aktorów krakowskich: Łucji Karelus – Malskiej, Alicji Mareckiej, Dominiki Stec, Jadwigi Gibczyńskiej, Rajmunda Jarosza i Jerzego Krasickiego.

- 12** - „Idalia i Bonfiliusz”/ - „Idalia kaj Bonfilius” – poemat Lidii Żukowskiej prezentowała Autorka oraz Lidia Ligęza i Andrzej Kołpanowicz.
- 13** - „Piękny i nieczuły”/ - „La bela indiferentulo” Jeana Cocteau – monodram Jadwigi Gibczyńskiej.
- 14** - Występ 30 – osobowego chóru żeńskiego - „Echo” z Łodzi pod dyrekcją Jana Kondratowicza/
- 15** - „Starożytność”/”Antikveco” - pieśni egipskie, greckie, rzymskie w wykonaniu Esperanckiego Zespołu Estradowego - „Kamea”.
- 16** - „Akademia szczęścia”/ - „Akademio de Felico” – aforyzmy, afirmacje, wiersze Urszuli Zybury prezentowały: Jadwiga Gibczyńska, Danuta Szczygieł i Janina Rżany.
- 17** - Inauguracja cyklu: - „Polscy Laureaci Nagrody Nobla”/ - „Polaj Laureatoj de Nobel – Premio” – część pierwsza poświęcona pamięci Marii Skłodowskiej – Curie: monodram w języku polskim - „Zaczęło się od Marii”/ - „Komencigis de Maria” – tekst: Mira Michałowska, wykonanie: Anna Ramza – Radłowska oraz monodram w języku esperanto - „Maria Curie” wg tekstów rodziny Curie i autorów współczesnych. Opracowanie i wykonanie: Jadwiga Gibczyńska.

Jaro 2003 / Rok 2003

- 18** - I. - „Podróż do zielonych cieni”/ - „Vojago al verdaj ombroj. Autor: Finn Methling. Monodram w wykonaniu Jadwigi Gibczyńskiej.
II.sprawozdanie z Kongresu Esperanto w Goteborgu (Szwecja) – Stanisław Mandrak – prezes Polskiego Związku Esperantystów (PZE)
- 19** - „Tuwim i esperanto”/ - „Tuwim kaj esperanto” w wykonaniu Zespołu Esperanckiego - „Sąsiadki”/ - „Najbarinoj”z Krzeszowic.
- 20** - „Areno” – na wesoło!”/ - „Areno” – distre!” – wesołe monologi, scenki, śpiewki, żarty, powiedzonka w wykonaniu Łucji Karelus – Malskiej, Jadwigi Gibczyńskiej, Zbigniewa Poprawskiego oraz zespołu - „Aire Andaluz”/ - „Rytm andaluzyjski” w składzie: Magda Malska i Krzysztof Hliniak (taniec), Magda Lechowska (śpiew), Adam Hliniak i Michał Kryglewski (gitara)
- 21** - Z cyklu - „Polscy Laureaci Nagrody Nobla” – Wisława Szymborska – - „Nic dwa razy się nie zdarza”/ - „Neni’ekos duan fojon”. W wieczorze udział

wzięli tłumacze na język esperanto: Lidia Ligęza, Grzegorz Turbański, Adam Łomnicki i aktorki: Jadwiga Gibczyńska i Janina Rżany.

22 - „Majka”/ - „Majnimfo” Bolesława Leśmiana – duo-dram w wykonaniu Jadwigi Gibczyńskiej i Lidii Ligęzy.

23 - „Czarny Kozioł”/ - „Nigra kapro” Bolesława Leśmiana w wykonaniu Jadwigi Gibczyńskiej, Lidii Ligęzy i Janiny Rżany.

24 - Z cyklu - „Polscy Laureaci Nagrody Nobla” - Henryk Sienkiewicz/ - „Sinjoro Henriko – en rememoroj de Helena Modrzejewska” - w wykonaniu Jadwigi Gibczyńskiej, Rajmunda Jarosza i Urszuli Federowicz (recital fortepianowy) **25** - „Witaj majowa jutrzeńko”/ program muzyczny w wykonaniu Esperanckiego Zespołu Estradowego - „Kamea” pod kier. Zbigniewa Warmuza.

26 - „Syndrom moralności stosowanej”/ - „Sindromo de moraleco praktikata” - wieczór autorski Krystyny Hawleny i Anny Cudejko

Jaro 2004 / Rok 2004

27 - „Z Nowym Rokiem do Europy”/ - „Novjare al Europo” – koncert Esperanckiego Zespołu Estradowego - „Kamea”

28 - Wieczór autorski Lidii Ligęzy/ Autora vespero de esperanta poezio; oprawa muzyczna – Julia Kołpanowicz (skrzypce)

29 - „Tryptyk Rzymski”/ - „Triptiko Roma” Jana Pawła II – monodram Dominiki Stec.

30 - Z cyklu - „Polscy Laureaci Nagrody Nobla” – Czesław Miłosz – - „Ściganie celu”/ - „Casadi la celon”. Wykonawcy: Jadwiga Gibczyńska, Łucja Karelus – Malska, Anna Ramza – Radłowska, Lidia Ligęza i Rajmund Jarosz.

31 - „Teatr przy stoliku” – - „Najważniejsze jest niewidoczne dla oczu”/ - „La plej grava nevideblas por okuloj” – monodram Jadwigi Gibczyńskiej na motywach - „Małego Księcia” Antoine de Saint Exupery. Oprawa muzyczna- Magdalena Milkowska (skrzypce) Joanna Zdebska (fortepian).

32 - „Nieustannie szukam” / - „Mi sencese serĉas” – wieczór autorski Józefy Ślusarczyk – Latos. Recital fortepianowy Urszuli Federowicz.

33 - „Z ziemią krążymy”/ - „Kun la tero ni giras” – występ 12 – osobowego

zespołu dziecięcego - „Akolada”. Kierownictwo muzyczne i akompaniament – Grażyna Nazarko.

34 - „Ja versus ja”/ - „Mi kontrau mi” – wieczór autorski Marcina Kani i Michała Sudoła. Oprawa muzyczna – Marzena Gruszecka.

35 - „Jesteśmy częścią tej ziemi”/ - „La ero de l’tero ni estas” (ekologia i życie). Gość honorowy – Halina Wiesława Dobrucka, udział aktorski: Renata Fiałkowska i Jadwiga Gibczyńska.

Jaro 2005 / Rok 2005

37 - „W Nowy Rok 2005 śpiewająco”/ - „En la Novan Jaron 2005 - kantate”- występ Esperanckiego Zespołu Estradowego - „Kamea” pod kier. Zbigniewa Warmuza

38 - Z cyklu - „Polscy Laureaci Nagrody Nobla” – - „Maria Skłodowska – Curie. Opowieść biograficzna”/ - „Biografia rakonto” wg materiałów rodziny Curie: Marii, Piotra, Ewy. Adaptacja tekstów i wykonanie – Jadwiga Gibczyńska.

39 - Federico Garcia Lorca (1898 – 1936) - „Poeta Hiszpanii / - „Hispana poeto”. Wieczór poezji w wykonaniu aktorów: Łucji Karelus – Malskiej, Alicji Mareckiej, Krystyny Stankiewicz, Rajmunda Jarosza (rectacje), Magdy Lechowskiej (śpiew), Adama Hliniaka (gitara) oraz zespół TAJO DE PLATA. Słowo wiążące - Jadwiga Gibczyńska.

40 - „Dzieci witają wiosnę”/ - „Infanoj salutas printempon” program poecko – muzyczny w wykonaniu dzieci ze szkoły Podstawowej w Czajowicach oraz dzieci ze Szkoły Muzycznej dla Niewidomych i Słabowidzących w Krakowie. Kierownictwo artystyczne – Elżbieta Haręźlak. Spotkaniu towarzyszył pokaz i nauka flamenco(Małgorzata Drzał, Grzegorz Guzik)

41 - Pokaz tradycyjnych tańców irlandzkich i szkockich ”Beltane”/”Ogień bela – zwiastun nadchodzącego lata” w wykonaniu zespołu - „Leanon Sidh” pod kierownictwem Teresy Janusz, działającego przy Klubie Inteligencji Katolickiej.

42 - „Pieśni polskie”/ - „Polaj kantoj” - program wokalny – słowny w wykonaniu Esperanckiego Zespołu Estradowego - „Kamea” pod kierownictwem Zbigniewa Warmuza z udziałem Jadwigi Gibczyńskiej

(recytacja)

43 - „Refleksje listopadowe”/ Pripensoj novembraj” – wieczór poezji Józefy Ślusarczyk – Latos oraz z cyklu - „plscy Laureaci Nagrody Nobla” – Władysław Stanisław Reymont – - „Jesien w Lipcach” – relacja Jagustynki, krótki fragment wprowadzający w interpretacji Jadwigi Gibczyńskiej.

44 - „Światowy Kongres Esperanto w Wilnie” - „Mondkongreso de Esperanto en Vilno”. Spotkanie z uczestnikami Kongresu relacjonował Przewodniczący Polskiego Związku Esperantystów mgr inż. Stanisław Mandrak. Swoimi wrażeniami z 61. Światowego Kongresu Młodzieży w Zakopanem w sierpniu 2005 dzieliła się mgr Maria Majerczak ze Światowego Związku Nauczycieli – Esperantystów (ILEI) w Polsce, a o tym jak uczy dzieci języka esperanto opowiadała Elżbieta Haręźlak.

45 - Z cyklu: - „Polscy Laureaci Nagrody Nobla” – Władysław Stanisław Reymont - „Chłopi”/ - „Kampuloj” odcinek II – - „Lipce w piątki i świątki” – relacja Jagustynki w interpretacji Jadwigi Gibczyńskiej. Słowo wstępne – Celina Dudek.

46 - 5-lecie Sceny – „Areno” / 5-jariĝo de la Scenejo : Karol Wojtyła - „Sygnały”/ - „Signaloj” - fragment dramatu - „Przed sklepem jubilera” / fragm. de dramo „Antaŭ vendejo de la juvelisto” - monodram Jadwigi Gibczyńskiej. Premiera odbyła się 2 lutego 2001 roku w Śródmiejskim Ośrodku Kultury w Krakowie inaugurując działalność Sceny - „Areno”.



Fonto / Ŵródlo:

Esperanto-Teatro www.esperanto-teatro.blogspot.fr

La gazetara komuniko n-ro 462 de UEA www.uea.org/gk/462

Libera enciklopedio en Esperanto www.wikipedia.org

Krakova Urbocentra Kulturdomo / Ŵródmiejski OŴrodek Kultury
www.lamelli.com.pl

Prilaboris / Opracował: Adam Wilkus

Prezentite akompane al fotoekspozicio pri la Aktorino dum jubileaj XXX
Esperanto-Tagoj de Krakovo okazintaj 3-5 majo 2016 en Kulturdomo
„Podgórze” (str. Sokolska 13, 30-510 Kraków, Pollando) organizitaj de
Krakova Societo ESPERANTO: www.esperantujo.aq.pl